

Esperanto-vivo en Svislando, 7-a parto
Elementa kurso programita: Ekzemplo
Claude Gacond, 396-a radioprelego, 1971.05.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- Pluraj geaŭdantoj plurfoje skribis al ni, por ke ni alportu informojn pri la nuna stato de nia laboro koncerne al la verkado de *Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj*.

Cl.- Tre volonte ni hodiaŭ parolos pri nia laboro. Ni komencis la sisteman verkadon de tiu kurso en la jaro 1968. Unue ni faris analizon pri la diversaj lingvaj refleksoj, kiujn devas akiri gelernantoj, kiuj studas esperanton. Kaj ni ordigis tiujn refleksojn laŭ ties interdependeco.

A.- La unua reflekso estas, ke la substantivoj finiĝas per **—o**. La dua, ke la difina artikolo estas **la**, la tria, ke la plurala marko estas **—j**.

Cl.- Programita kurso celas la instruadon sen profesoro. Pro tio ĉiuj klarigoj, kiujn profesoro donus, devas troviĝi en la kurso. Sed la profesoro adaptas la klarigojn al la nivelo de la kursanoj. Al lernantoj, kiuj jam bonege konas la gramatikon kaj parolas plurajn lingvojn, li instruas aliel, ol al gelernantoj, kiuj ĉion forgesis koncerne gramatikon aŭ neniam kapablis distingi substantivon de verbo.

A.- Tiujn distingojn faras programita kurso helpe de testoj. Ekzemple la programita kurso por franclingvanoj komenciĝas per testo, kiu kontrolas, ĉu la lernantoj scias, kio estas substantivo. La lernantoj, kiuj sukcese trapasas tiun teston saltos la klarigojn pri la substantivo kaj tuj lernos, ke en esperanto ĉiuj komunaj substantivoj finiĝas per **—o**. La lernantoj, kiuj malsukcesis en tiu testo ricevas klarigojn pri tio, kio estas substantivo.

Cl.- Same estas pri aliaj gramatikaj punktoj. Sed programita kurso ne devas kontentiĝi seke instrui gramatikon. Ĝi ankaŭ devas doni klarigojn pri la lingvo. Kaj ni povis konstati, ke tiujn lingvajn klarigojn ege ŝatas la lernantoj.

A.- La venontan semajnon ni tradukos esperanten klarigojn pri etimologio, kiujn ni donas en la sepa ĉapitro. Tiel vi havos ideon pri tiu aspekto de tiu programita kurso.

Cl.- La diferenco inter programita kurso kaj klasika kurso troviĝas en tio : Programita kurso dividas la instrumaterialon laŭ iu analiza tekniko per sekvo de klarigoj, demandoj kaj respondoj. La lernantoj tre ŝatas tiun strukturon. Ili estas konstante aktivaj kaj trovas respondon, kiu ebligas tuj kontroli la ekzaktecon de la propraj respondoj.

A.- Jen parto de la 5-a ĉapitro, kiu instruas pri la propraj nomoj kaj pri la komparativo :

Cl.- Informado :

En la ĉielo brilas steloj kaj planedoj.

Suno estas stelo.

Luno, Venuso, Jupitero estas planedoj.

La planedo Luno estas la satelito de la planedo Tero.

La planedoj Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Urano kaj Neptuno estas satelitoj de la stelo Suno.

Suno estas pli granda ol la planedoj.

Luno estas malpli granda ol Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Suno.

Tero estas pli granda ol Merkuro, Venuso, Marso kaj Luno.

Tero estas malpli granda ol Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Suno.

Esperanto-vivo en Svislando, 7-a parto
Elementa kurso programita: Ekzemplo
Claude Gacond, 396-a radioprelego, 1971.05.12 & 15

Ĉu Luno estas malpli granda ol Tero ?

A.- La lernantoj devas respondi skribe. Poste ili povas kontroli sian respondon. Ili legas :

Cl.- Jes, Luno estas malpli granda ol Tero.

A.- Kaj ili trovas novan demandon :

Cl.- Ĉu Merkuro estas pli granda ol Tero ?

A.- Ili devas respondi skribe. Por tion fari ili certe relegos la suprajn klarigojn. Kaj ili povos tuj kontroli la ekzaktecon de sia respondo :

Cl.- Ne, Merkuro estas malpli granda ol Tero (aŭ) Ne, Merkuro estas pli malgranda ol Tero.

A.- La lernantoj antaŭeniras paŝeton post paŝeto. Fine de la ĉapitro, kies studo daŭras proksimume unu horon, ili trovas test-folion. Jen ekzemplo pri la testo de tiu sama 5-a leciono :

Cl.- Aldonu la gramatikan finaĵon, kiu konvenas : **a – as – e – i – o** :

a. Ŝi venas per la trajn... ; b. Li devas dorm... pli longe : c. Ni ne parolas en la german... lingvo ; d. La vento blov... forte.

A.- Kaj tiel plu. La lernantoj resendas nur la testfolion. Estas tiel tre facile kontroleble, ĉu ili asimilis aŭ ne asimilis la instruobjektojn. Se ili asimilis la kurs-enhavon, ili ricevas la sekvan ĉapitron. Se ne ili ricevas ripetajn klarigojn. Programita kurso estas speco de laŭmezura kurso.

Cl.- La verkado de bone programita kurso estas tre longa laboro. Ni povis kalkuli, ke la redaktado de unuhora ĉapitro por la lernantoj kaŭzas al ni inter 150 kaj 200 laborhorojn por la analizoj, redaktado kaj multobligado.

A.- Antaŭ ol ricevi definitivan formon, programita kurso devas esti eksperimentita ĉapitron post ĉapitro. Tiu eksperimentado devas indiki, kion la gelernantoj ne komprenas. Nur post reverkado oni povas konsideri, ke la laboro estas finita.

Cl.- Ni ĝis nun finredaktis la 8 unuajn ĉapitrojn, komencis la redaktadon de la tri sekvaj ĉapitroj, dank'al la kunlaboro de preskaŭ 200 gelernantoj ni kontrolis la efikecon de la jam redaktitaj ĉapitroj. Ni esperas povi fini la redaktadon de tiu programita kurso dum la venontaj monatoj, por povi ĝin sisteme diskonigi ekde la venonta aŭtuno.

A.- Ni volonte sendos la unuan ĉapitron al la geaŭdantoj, kiuj ĝin petos al Radio-Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-